


LA JUNA VIVO



ORGANO POR LA INFANOJ

T.J.O. CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO, ĜIRO 382363 • JARKOTIZO 1.- NED. GULD. AŬ EGALVALORO

Li ne povis tion.

Iu studento multe fanfaronis en gastejo pri siaj kapabloj kaj sukcesoj. Fine iu sinjoro ekkoleris kaj diras al li: „Nu, ni jam aŭdis sufiĉe pri tio, kiom kaj kion vi kapablas! Diru al mi, kion vi ne kapablas, kaj mi certigas ke mi nepre faros ĝin.”

„Ĉu vere?” demandis la studento.

„Tutcerte!” respondis la sinjoro, eĉ pli kolere.

„Nu, mi ne povas pagi mian ŝuldon al la gastejestro.”

Dum ĉiuj ĉeestantoj ridegis, la fremda sinjoro pagis, kun malafabla mieno.

La Vintro.

La neĝo falas kaj kovras la teron. La suproj kaj branĉoj de l' arboj estas tute blankaj, kaj la tegmentoj de la domoj malaperis sub la neĝo kiu kovras ilin. Estas malvarme: la vento blovas. La kamparano ne povas forlasi sian domon kaj la brutoj restas en la stalo. Ĝis tre malproksime oni vidas nur la neĝon kiu envolas la teron kvazaŭ per granda mantelo.

La bestoj sin kaŝas. — Ĉie regas la silento.

Ho ve! Kiom da kompatinduloj suferas nun!

ĈU VI JAM VARBIS VIAN AMIKON POR „LA JUNA VIVO”?

La lupo kaj la ŝafido.

Malgranda ŝafido malproksimiĝis de sia patrino. Ĝi venis al rivereto. Ĉar ĝi soifis, ĝi komencis trinki.

Lupo trinkis iom pli malproksime. Ĝi tuj sentis emon engluti la ŝafidon. Por justigi tiun kruelan agon, ĝi serĉis kverelon kun la ŝafido.

„Kial vi malklarigas la akvon, kiun mi trinkas?”

„Reĝa moŝto,” respondis la ŝafo tremante, „kiel mi povus malklarigi la akvon kiun vi trinkas? La kuro de la akvo estas de vi al mi, kaj mi estas pli ol dudek paŝojn de vi.”

„Vi malklarigas ĝin!” ripetis la kruela besto. „Kaj mi scias, ke vi parolis malbone pri mi la pasintan jaron.”

„Kiel mi povis fari tion? Antaŭ unu jaro mi ankoraŭ ne naskiĝis!”

„Se ne estis vi, do estis via frato!”

„Mi ne havas fraton.”

„Tiam estas unu el viaj parencoj. Ĉar mi scias, ke vi ĉiuj malamas min, vi, viaj paŝtistoj kaj viaj hundoj. Mi volas venĝi, kaj mi venĝos!”

Post tiuj vortoj la lupo ĵetis sin sur la kompatindan ŝafidon kaj englutis ĝin.

Respondu al la demandoj: Kiu malproksimiĝis de sia patrino? Kia estis la ŝafido? Kien ĝi iris? Kion ĝi havis? Kion ĝi faris? Ĉu la ŝafido estis sola ĉe la rivereto? Kiu ankaŭ trinkis? Kion sentis la lupo? Ĉu ĝi tuj formangi la ŝafidon? Kion ĝi diris? Kial la ŝafido ne povis malpurigi la akvon de la lupo? Ĉu la ŝafido jam vivis antaŭ unu jaro? Ĉu ĝi havis fratojn? Kion faris la lupo fine?

Kiu volas helpi nin?

Nederlandanoj volas organizi (dum la monato Aprilo) grandan ekspozicion de infanaj desegnaĵoj en Amsterdam.

Ni estus feliĉaj ankoraŭ ricevi desegnojn el la tuta mondo.

La ekspozicio estos granda propagando por nia movado.

Speciale la instruistojn (kun gelernantoj!) ni invitos viziti la ekspozicion.

Sendu do desegnaĵojn al: C. Geurts, lernejestro, Edam, Nederlando. Ni ankaŭ bezonas multe da esperantaĵoj: **internaciajn interlernejajn korespondaĵojn**, k.t.p.

Mi dankegas vin en la nomo de multaj nederlandanoj!

C. Geurts.

La blinda ĉevalo.

Mi vojaĝis en Britonujo, tre malriĉa lando, kie oni trovas multe da ne-kulturitaj kampoj kaj senakvaj erikejoj. Okazis en junio, kiam la vetero estis tre varma. Mi supreniris lacigan vojon. Apud mi estis ĉareto plena de ardezoj.

Baldaŭ mi rimarkis ke la kondukisto, malriĉa, ĉifona maljunulo, tiom multe tiris kiom la ĉevalo.

„Amiko,” mi diris al li, „vi tro-lacigos vin.”

„Ho sinjoro, ne gravas: mi helpas mian kompatindan ĉevalon, kiu estas blinda. Ĝi estas mia sola amiko kaj mia tuta fortuneo.”

Ni alvenis sur la supro de la monto. La veturilo haltis. La grizulo viŝis la ŝviton de la korpo de sia ĉevalo, kaj la besto danke frotis sian kapon kontraŭ la vizaĝon de sia mastro. Mi kortuŝiĝis kaj donis la duonon el mia monujo al tiu brava viro, kiu ne komprenis mian emocion.

Respondu al jenaj demandoj: Ĉu Britonujo estas riĉa lando? Kion oni trovas tie? Kiam mi estis tie? Kia estis la vetero? Ĉu la vojo estis bona? Kio veturis apud mi? Kio estis sur la ĉaro? Ĉu la ĉevalo tiris sola? Kial la kondukisto helpis ĝin? Kia estis la kondukisto? Kio okazis sur la supro de la monto? Kion mi donis al la viro? Kial mi faris tion?

Ŝi komprenis!

La fama franca aŭtoro Aleksandro Dumas dum sia vojaĝo en la germana kantono de Svisujo petis al sia dommastrino fungojn. Sed ŝi ne komprenis lin, ĉar la dommastrino parolis nur germane, kaj Dumas nur france. Fine la fama aŭtoro desegnis per kreto sur la pordon la formon de fungo. Tiam la dommastrino ĝoje ekkriis: „Nun mi komprenas vin!” — kaj ŝi alportis al li..... pluvombreton.

El „Internacia Kulturo”.

Tasko por komencantoj:

1. Legu kaj kopiu la „rakontojn” en la rubriko por komencantoj kaj traduku ilin en vian gepatran lingvon.
2. Rakontu per propraj vortoj la enhavon de „Li ne povis tion” kaj de „Ŝi komprenis”.

La kluba festo. (infana verkaĵo)

Kvankam la kristnaskaj tagoj jam pasis, ni tamen festis Kristnaskon je dimanĉo posttagmeze, kun niaj klubamikoj.

Ni estis tre silentaj. Eble kaŭzis tion la nova klubamiko, aŭ ĉu la Kristnasko?

Ni kantis kristnaskajn kantojn kaj Esperanto-kantojn.

La kristnask-arbon ni ne forgesis. Ĝi estis en la centro de la vespero, kun siaj kandeloj. Ni ankaŭ aŭdis kiel oni en aliaj landoj festas kristnaskon.

Dum la kandeloj brulis ni ricevis frandaĵojn. Ili tre bongustis. Baldaŭ estis la sepa horo, kaj ni rapide iris al la hejmo.

Gusta v. d. Pol, Hilversum, Nederlando.

A. (por la infanoj).

A estas la alaŭdo, ĉar ĝi supren, supren flugas kaj kantas.

A estas ankaŭ la abio, ĉar ĝi rekte supren, supren kreskas kaj verdas dum la vintro.

A ja estas albatroso, ĉar ĝi amegas la sovaĝan maran venton.

A estas tial ankaŭ la antilopo, rapida kiel la vent'.

A, ho, estas la malluma, profunda arbaro.

A estas miloj, miloj da abeloj, ĉar ili trovas la kovritan nektaron.

A do estas la arĝenta araneaĵo.

A tio ja estas la ankro, la signo de l' esper'.

A nur estas la amo, la plej plej bela en la mond'.

A estas adiaŭ, adiaŭ..... adiaŭ, adiaŭ, adiaŭ.....

Sendu ideojn pri la litero B!

Rogiero.

La solvo de la kalkultasko en la novembra numero:

Se ni enkalkulas la trajnon, kiu alvenas en A sammomente, kiam nia trajno forveturas, kaj la trajnon, kiu forveturas de B, kiam nia trajno tien alvenas, ni renkontos entute 15 trajnojn dum la septaga veturo. Jen:

0	12	24	12	24	12	24	12	24	12	24	12	24	12	24	
A.	x	/	x	/	x	/	x	/	x	/	x	/	x	B.	
	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15

(la supraj ciferoj estas la horoj, je kiuj la trajnoj renkontiĝas; la mal-supraj estas la numeroj de la renkontitaj trajnoj.

Ni ricevis diversajn solvojn, sed bedaŭrinde neniun bonan! Ĉu la tasko estis tiom malfacila? Bedaŭrinde, ĉar la aŭtoro de la enigmo donis du beletajn ekstrajn premiojn, kiujn nun neniuj gajnis! Ĉifoje Rogiero faris tre simplan enigmon, kiun certe ĉiu povos solvi! Sendu la solvon al TJO-Centro antaŭ la 1-a de marto. Inter la ĝuste-solvintoj ni lotumos premion.

Sorĉa kvadrato.

	1	2	3	4
1	-	-	-	-
2	-	-	-	-
3	-	-	-	-
4	-	-	-	-

Horizontale kaj vertikale:

1 malgrasa likvaĵo. — 2 demanda adverbo, signifanta: kiamaniere? — 3 laŭ maniero, konforma al la realo. — 4 grasa likvaĵo.

Rogiero.

LA KAMENISTO. (Rond-ludo).

C = 1

$\frac{4}{4}$	5	5 5 5	6 6 5 .	2 . . 5	i . . 3
	Jen	vojaĝas	kamenist',	Jen	vo - ja - ĝas
	5 5 4 .	5 5 4 .	2 . . 4	7 . . 6	5 7 i .
kamenist',	kamenist'	Jen	vo - ja - ĝas	kamenist'.	

2. Preterpasas domon ja, Preterpasas domon ja, domon ja, Preterpasas domon ja.
3. Nun aperas belulin', Nun aperas belulin', belulin', Nun aperas belulin'.
4. Ah knabino, diru jes, Ah knabino, diru jes, diru jes, Ah knabino diru jes.
5. Mi ne scias, ho ne ne, Mi ne scias ho ne ne, ho ne ne, Mi ne scias, ho ne ne.
6. Nu knabino, diru do, Nu knabino, diru do, diru do Nu knabino, diru do.
7. Iros al la patro mi, Iros al la patro mi, patro mi, Iros al la patro mi.

8. Paĉjo, ĉu mi diru jes, paĉjo ĉu mi diru jes, diru jes,
Paĉjo, ĉu mi diru jes?
9. Etulino mia, ne, Etulino mia, ne, mia ne,
Etulino mia ne!
10. Ŝi forkuras el la dom', Ŝi forkuras el la dom', el la dom',
Ŝi forkuras el la dom'.
11. Post ŝi ja la kamenist', Post ŝi ja la kamenist', kamenist',
Post ŝi ja la kamenist'.
12. Iras kune al Pariz', Iras kune al Pariz', al Pariz'
Iras kune al Pariz'.
13. Ja ĝemeloj tie ĉi, Ja ĝemeloj tie ĉi, tie ĉi,
Ja ĝemeloj tie ĉi.
14. Al Afriko kune nun, Al Afriko kune nun, kune nun,
Al Afriko kune nun.
15. Prenas negron tie ĉi, Prenas negron tie ĉi, tie ĉi,
Prenas negron tie ĉi.
16. Negro dancas trulala', Negro dancas trulala', trulala',
Negro dancas trulala'.
17. Ĉiuj homoj dancas ja', Ĉiuj homoj dancas ja, dancas ja,
Ĉiuj homoj dancas ja.

La infanoj formas rondon. Unu el ili estas la kamenisto (kamen-
skrapisto) kaj rondiras, dume la aliaj kantas.

Ĉe „Nun aperas belulin’”, li elektas knabinon el la rondo. Nun la aliaj silentas kaj ili kantas laŭvice. Tiam la knabino turnas sin al la patro (ankaŭ unu el la rondo.) Poste ŝi forkuras (kuras rapide runde kun la kamenisto post si.) Li atingas ŝin kaj ili iras kune. La aliaj kantas ree. K.t.p. La cetero estas komprenebla.

Rogiero.

SKOLTA RUBRIKO.



Britujo: Lia reĝa moŝto, Georgo VI, ĵus akceptis skoltraton David Western en la Ordenon de Albert. Dum la pasinta vintro, kiam li estis lupido, David savis alian lupidon, kiu estis drononta pro rompiĝinta glacio en malgranda lago.

La reĝo poste vokis David en sian privatan ĉambron por lin gratuli.

Krome David ricevis la skoltan arĝentan krucon pro tiu heroaĵo.

Ni sekvu la ekzemplon de nia frato David kaj memoru ke: „Skolto estas kreita por helpi kaj savi aliulojn.”

Norvegujo: Ĉi tiun vintron, por la dua fojo, la urbo Oslo donacis altan kaj belegan kristnaskarbon al la Londona junularo. Post la invito de la

urbestro de Oslo brita mara skolto kaj ne-skolto vojaĝis al Oslo por danki la urbestron en la nomo de la brita junularo kaj elekti la abion.

Sudafriko: La regionan ĵamboreon en Sudafriko partoprenis ĉirkaŭ 1500 skoltoj; inter ili troviĝis 117 skoltoj el Natal.

La tendaro enhavis dek subtendarojn, kaj ĉiu el ili havis la nomon de afrika besto, kaj havis sian honorenirejon. En la tendaro troviĝis ĉio, kio estas necesa.

Unu el la ĉefaj gastoj estis la filo de Lord Baden Powell. Li komencis tendaran fajron ekbruligante pecon da ligno el tendara fajro, kiu okazis en la jaro 1933 kaj havis lokon en Perth (Skotlando), kaj li konvinke pri-traktis la neceson de tiaj internaciaj kunvenoj.

Svisujo: Dum la lasta somero Svisujo estis la lando plej vizitata de geskoltoj. Ĝin vizitis 499 britaj skoltoj.

Aliaj landoj, vizitataj de multaj skoltoj estas Nederlando kaj Francujo. Tiujn vojaĝojn ebligis la multnombraj interligiloj, kiuj ekzistas en nia internacia frataro. Unu el tiuj interligiloj estas la uzado de Esperanto. Oni do ne uzas Esperanton nur por interŝanĝi poŝtmarkojn! Kontraŭe, oni uzas ĉi tiun lingvon por viziti kaj helpi unu la alian!

La internacia oficejo en Londono ĵus akceptis Grekujon, Italujon, kaj Filipinajn Insulojn kiel membrojn de Internacia Skoltismo.

Lihtenŝtejno kaj Meksiko estas akceptitaj kiel aliĝantaj landaj federacioj.

Ĉar Hindujo estas dividita en du ŝtatoj, la hindaj skoltestroj petis aliĝon sub la nomo: Hindujo kaj Pakistano.

Al la skoltoj de tiuj landoj ni deziru bonan skoltan agadon!

T.J.O.-RUBRIKO.

Sekr. Arie Schouten, No. 122, Oosthuizen, Nederlando.

Aŭstralio nun ankaŭ havas ĉefperanton: S-ro F. Halls, Bogong, Via Wodonga V I C. Espereble baldaŭ kreskos forta sekcio el la malmultaj anoj!

Belgujo: Okaze de la jarŝanĝiĝo la TJO-grupo en Bruselo mem faris kvanton da kalendaroj kaj novjarkartoj, kiujn ili vendis (kaj ankoraŭ vendas), por akiri monon por la propagando. Kaj

kompreneble propagando necesas por disvastigi kaj plifortigi la sekcion! Bonega ekzemplo, certe imitinda!

Maroko: Oni bonvolu atenti, ke la ĝirkonto de la ĉefperanto staris erara en LJV. Ĝi estas: „Rabat” c/c 368.92 (do ne 368.9z, kiel staris en LJV de novembro '48).

Polujo: La ĉefperanto informis, ke stariĝis Pola esperanta Junular-Asocio. Multaj anoj ankaŭ estas TJO-anoj, do esperu ni, ke la Asocio baldaŭ fariĝu TJO-Sekcio.

La kotizojn por TJO/LJV en Polujo oni bonvolu pagi per la poŝtkonto: P.K.O., Gdynia XI, 4708, de B. Palczynski.



KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Belgujo: 21-j. gimnastikisto dez. interŝanĝi, k. eksterlandanoj, spertojn k. fotojn pri gimnastiko, korpa edukado, sportoj. Fred. Ramon, Westmeersch 37, Bruĝo.

Bulgarujo: Stefan Krastev Stefanov, str. „Ilia Kuŝev” 6, Sofio 9, dez. kor. k.ĉ.l. pri: historio, geografio, moroj, popolmuziko, elektro- k. radiotekniko.

Ĉeĥoslovakujo: Junaj geesperantistoj dez. kor. kun ĉiuj landoj. Resp. certa Esperanto-Servo, Ŝumavska 250, České Budejovice.

Karel Hajek, Hodejovice ĉ 1, České Budejovice, dez. kor. kun gesamideanoj pri ĉiuj temoj, kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Respondo certa.

S-ro Bedrich Pagáč, Masarykova 137, Karlovy Vary — Dvory, 27-j., dez. korespondi pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn.

Du samideanoj (17- k. 21-j.) dez. kor. pri ĉ.t. kun korespondantinoj. Resp. certa. Skribu al Vlastimil Paclt, Česká Lipa 197.

Francujo: Grupo de 30 lernantoj (13-17-j.) dez. kor. kun samaĝaj gesamideanoj en la tuta mondo. Collège Turgot, 69 rue Turbigo, Paris 3e.

Germanujo: Gerhard Höppner (instruisto), Schenefeld b. Hamburg, Allee 1, serĉas korespondantojn por siaj lernantoj (13-40-jaraj).

Clemens Nassenstein (20-j.), 22c Wipperfuert-Haemmern, deziras korespondadon kun ĉiulandaj gejunuloj.

Esperanto-grupeto de dek (7-14-j.) infanoj deziras korespondi kun samaĝaj gekamaradoj. Adr. Hermann Poschmann, Pfarrstr. 44, Hannover.

Hispanujo: Pedro Parra, San Jaime, Tortosa, Tarragona, deziras korespondadon kun ĉiuj landoj, kaj interŝanĝi poŝtkartojn.

Hungarujo: S-ro Paŭlo Balkányi atentigas, ke lia nuna adreso estas: Budapest 54, MNB/FO.

Italujo: Esperanto-junular-grupo dez. interŝ. leterojn, bildkartojn, poŝtmarkojn. Giorgio Bronzetti, v. S. Martino 8, l' Aquila (Abruzzo).

Nederlando: „Poŝtkartkunveno”. Bonvolu sendi al ni poŝtkarton de via lando, kaj ni sendos al vi il. poŝtkarton de Hilversum. Junulargrupo „La Kukolo”, Koekkoekstr. 22, Hilversum.

F-ino Tiny Jakma (21-j.), Westerkade 30, Gouda, dez. kor. kun ĉiuj landoj. Respondo garantiata.

SENPAĜAJ LIBROJ KAJ GAZETABONOJ: La 3-a Internacia Muzikfesto (1949) presigas belan programon en Esperanto. Al ĉiu, kiu konigas ĝin al alilanda horo aŭ dancistaro ni donos premie esperantan libron aŭ gazetabonon. Apartaj premioj por gravaj kaj belaj salutoj. Informas la sekretariino, Ponciau, Wrexham, Britujo.

PENTRO-ARTISTOJ: desegnu afiŝon por la 3-a Internacia Muzikfestoj! Valoraj premioj. Informos la sekretariinoj, Ponciau, Wrexham, Britujo.